

& Sabaton vespere:

< Ripete 16 el 32 batoj por strofo, entute 256 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4876. El dana tradukis >

(#Melodio:

<1,2:2> ((h;So /dodo SoSo /mi domi /reTi SoTi /do)×

h;mi /mimi somi /rere soohre /dodo lala /so o2h;fa3 /mimi somi /mire faahre /doTi LaTi /do)×8)+

(&Strofoj:

'1 (Sabate mi vespere atendis longe vin ;)× (Promeson vian pri vizit', vi ne plenumis ĝin ;)×

'2 (Sur lito mi ekuŝis, amaris mia plor' ;)× (Kaj kiam pordo movis sin, eksaltis mia kor' ;)×

'3 (Dimanĉe mi leviĝis, hararon plektis ĉar ;)× (preĝejon iri volis mi, al korto de l' tombar' ;)×

'4 (Sed tie vi forestis, preĝeje mankis vi ;)× (forĝesis certe min kaj nun alian amas pli ;)×

'5 (Revenis hejmen sola de l' templo ĝis la farm' ;)× (En ĉiun spuron sur la voj' de mi ekgutis larm' ;)×

'6 (Rubando ruĝe bela ne plu ornamas min ;)× (Ne decas via amdonac' al mia mortinklin' ;)×

'7 (Ĉu eblas pluki rozojn sur bed' sen ĉia flor'?)× (Ĉu eblas trovi amon do en jam senama kor'?)×

'8 (Mi volis pluki rozojn, ne plu kolektas mi ;)× (El mia vin aminta kor' jam fuĝis la pasi' ;)×)